

Detlev von Liliencron,  
Vilaĝa preĝejo en somero

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Lace kantas la kantor',  
lace la paroĥanaro.  
Sur ambono la pastor'  
preĝas por malamikaro.

Poste la prediko ja  
vere estas grandioza.  
Ploras baronin' sur la  
supra seĝo blazonoza.

Amen, beno, de l' orgen'  
lasta sono. Tra l' aero  
flirtas papilioj jen  
en la gloro de l' somero.

*Traduko de la Germana poemo "Dorfkirche im Sommer" de DETLEV VON LILIENCRON (\*1844-06-03 – †1909-07-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2004-08-31.*

*MR-425-1 / Arg-281-573 (2005-02-06 13:07:33)*